

Kajeroj el la Sudo

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k84.html>



*La solaj
militoj estu
kontraŭ
mizero kaj
globalvar-
migo!*

Ne al milito!

Redaktore

Ne al milito!

Iam en ĉi tiu lando, prezidanto de registaro devis honori la pakton NATOan, kiun alia prezidanto de Hispanio, socialisto, subskribis.

Sed la estro de la opozicio, socialisto, prenis la stratojn kun siaj partianoj laŭ la moto **¡No a la guerra!** (Ne al milito!), senrigarde al la internaciaj devigoj de la lando, kiun tiu konservativa prezidanto ne subskribis, sed tamen devis honori nome de nia lando. Kiam bedaŭrinde okazis atencoj kontraŭ trajnoj, tiutempe iomete poste, tiuj partianoj surstrataj kulpis la registaron pro tio, ke nia partopreno en tiu milito okazigis la atencojn de islamistoj kontraŭ niaj trajnoj. Ili ankaŭ freneze kriis, ke **Hispanio ne meritas registaron, kiu mensogas!**, klarigante, ke la ekspliko de la registaro, ke la trajnojn bombis teroristoj de hispana regionsendependistoj de ETA estis mensogo, ĉar konvenis al opozicio, mastro de la stratoj, ke la aŭtoroj estu islamanoj.

Sekve, tiuj kiam la tiama gvidanto de la opozicio parlamenta venkis la balotadon, li ordonis la hispanan armeon veni el Irako, kie ĝi plenumis pacan mision. Laŭ la sekvintaj jaroj, li ade "vendis" al ni la

moton, ke **la solaj militoj luktendaj estas tiuj kontraŭ mizero kaj plivarmigo de la ter globo.**

Sed nun estas denove milito, kiun NATO batalas kontraŭ alia lando, kaj nia prezidanto senhonte sendas soldatojn hispanajn batali ne kontraŭ plivarmigo ter globa, aŭ kontraŭ mizero, sed kontraŭ islama lando, same kiel Irako. Ministro Blanco stulte asertas, ke ne decas kompari la militon de Irako kaj tiun kontraŭ Libio, ĉar nun la armeo agas laŭ la ordonoj de UNO, male al tiu de Irako. Sed li forgesas, ke kelkaj el ni havas memoron, kaj scias, ke dum la milito kontraŭ eks-Jugoslavio (ankaŭ sen mandato de UNO), miloj da hispanaj bomboj falis sur Bosnion laŭ ordonoj de alia prezidanto de Hispanio, S-ro Felipe Gonzalez Marquez, ankaŭ socialisto de PSOE, la



partio de S-roj Blanco kaj Zapatero. Gonzalez helpis Usonon milite, Aznar

helpis Usonon pli morale ol efike, kaj Zapatero helpas nun Usonon milite.

Kaj mi scias, ke la nuna prezidanto ne povas ne helpi NATOn. Sed estas io, kion li devintus fari anstataŭ sendi nian armeon kontraŭ lando, kiu neniam kontraŭis tiun nian, eĉ se Hispanio ne povas rifuzi helpi NATOn: li devus rezigni, tiel ke li daŭre defendusian belan moton, ne batali se ne kontraŭ mizero aŭ plivarmigo tergloba. Ne tion farante, li pruvas, ke li grave eraris: *Hispanio ja meritas, laŭ li,*

registaron, kiu mensogas. Kaj politikistojn malhonestajn.

Pro tio ni denove dediĉas bultenon kondamni militon, kaj averti la registaron, ke ili ne faras tion je nia nomo. Kvankam klare ni scias je kies nomo ili faras ĉion kaj la registaro, kaj la ceteraj parlamentanoj.

Malmilite via,

Jesuo.

Parolas la Prezidanto

Printempo kun milito

Estimataj gehaleanoj! Ni ne estas en paca somero de 2011 sed en printempo de 2011 kun milito.



Antaŭ ne multe da jaroj Prezidanto Aznar promesis al la popolo de Hispanio militon por demokratio en Irako. La maldestruloj diris al civitanoj de Hispanio, ke temas pri dekstraj ideoj kaj Aznar perdis balotadon ĝeneralan. Perdis Aznar kaj perdis lia lernanto: Rajoy.

Sed en tiu ĉi printempo kun milito maldestro diras: milito por demokratio, sed ili diras, ke ne milito por demokratio ne estas milito, sed humana helpo.

Nun la bomboj, la kugloj, la kugloj kiuj mortigas, ricevita kuglo en la

bruston nomiĝas humana helpo.

Kajeroj el la Sudo, kiam okazis la milito de Balkanoj, jam diris *Ne al la atakoj kontraŭ Serbio!*, poste ni diris *Ne al milito kontraŭ Irako!*, kaj nun ni diras *Ne al la atakoj kontraŭ Libio!*

Kapitalismo venkas en la aktuala klasbatalo, ĝi venkas ĉar nun ni devas labori pli multe kaj gajni malpli. Kapitalismo venkas. Mi devas labori dum pli da jaroj sed la kapitalistoj ne nur estas en liberejo sed ankaŭ ruinigas la ekonomion.

Dume, ni ĝuas printempon kun milito, kiun malvenkos laboristoj.



La Doloroj de Kalatajud'

Legendoj, faktoj kaj sekvoj

De kiam mi povas memori, mi konas popolan kanton hispanan, kies unuajn vortojn ni prezentas meze de ĉi tiu paĝo: *Se vi iras al Kalatajud', demandu pri La Doloroj, knabino tre bela kaj ema fari favorojn.* Kiam mi finfine vizitis tiun aragonan urbon, mi konstatis, ke demandite pri *La Doloroj*, lokanoj koleris akre, kaj diris, ke ja *sufiĉas pri tiu blago.* Sed kiu estis La Dolores? Ĉu ŝi vere ekzistis?

Tre penigan taskon konsistigas doni formon, koncize, al la graveco, la esenco kaj la atingo de universaligita legendo, vibranta kiel aragona ĥoto; ĉefe alloga pro la magio kiun ĝi elradias, kaj ornamita de la fisorĉo de dubsenca koplo kiu elstaras disde la mondo kiel simbolo de Kalatajud'.

Tiu ĉi legendo, eligita de koplo sen konata aŭtoro —la fonto—, estas forĝadita je la profito de la kreivaj impulsoj de dramverkistoj, muzikkomponistoj, novelistoj, kinartistoj, verkistoj ĉiestipaj, muzikludistoj, poetoj, ktp., krome de la nepraj alportajoj kaj popola kunlaboro, sur la ampleksa scenejo de la mondo, kaj estiĝis akvoabunda rivero kiu retroiras ĝis sia deveno —t.e. al Kalatajud'—, kun la stampo de l' universala akcepto kaj la trezordonaco de kultura kunhavaĵo unika kaj unuaranga.

Malmulte grava estas jam, ĉu estis virino naskita en Kalatajud', kiun oni prave aŭ malprave kantis la koplon. Jes, ja, pro ŝia eksterordinaraj beleco kaj unikeco de la historio kiun ŝi travivis kaj tial findecide influaj por vaste diskonigi ĝin.

La gravo estas la legendo mem. La plej konata versio montras la nepoluritan naivecon de

*Si vas a Calatayud
pregunta por La Dolores,
una chica muy hermosa
amiga de hacer favores.*

knabino honesta kaj ĉaritema servanta ĉe gastejo de Kalatajud. Ŝi estis tromplogita de barbisto Melĉor', kaj ŝin volis edzinigi

riĉega komercisto Patriŝjo, kaj la fanfarona serĝento Roĥas. Lazaro —porpastra katolika studento— freneze enamiĝas pri ŝi —hazarde, li ankaŭ estis la nevo de Gaspara, estrino de la gastejo—. Okaze de la baraktado pri La Dolores inter Lazaro kaj Melĉor, mortis ĉilasta pro ponardovundo.

La scenejo elektita de Feliu kaj Codina [kodina] por la disvolviĝo de sia literatura drama fikcio **La Dolores**, kaj tiu de Breton por sia mondfama opero, estas la antikva gastejo San Anton', de antaŭ ol jarcento konata kiel *Gastejo de La Dolores*. Ĉi tiu estas rimarkinda palaco de la 15-a jarcento —eble la plej antikva civila konstruaĵo el Kalatajud'. Ene de ties muroj, sub la arko de la ŝtonumita endoma korto, apud la krado kaj la putorando, eble estis La Dolores reala mem; sed ĉiel ajn, ĝi enhavas la

tutan sugestan kapablon por evokado kaj fabelo kiujn mito povas estigi.

La veraj faktoj.

"La Dolores", Maria de los Dolores Peinador Narvi3n, naskiĝis en Kalatajud' la 13an de majo de 1819 kaj estis baptata en la preĝejo de Santka Johano Reĝa (San Juan el Real). Estis ŝiaj gepatroj S-ro Blas: belaspekta leŭtenanto de la Reĝaj Armeoj kaj ankaŭ advokato, kiu estis naskiĝinta en Galegujo; ŝia patrino Sjnorino Delfina Manuela apartenis al unu el la plej altrangaj familioj de Kalatajud'.

En 1825 oni nomumis S-ron Blas urbestron de vilaĝo Daroko (Daroca), kaj du jarojn poste forpasis en tiu urbo sia edzino heredigante abundajn havaĵojn al Dolores kaj ties fratoj. Ĉar la heredantoj estis neplenaĝaj administris la havaĵojn sia patro.

S-ro Blas denove edziĝis; rolis dum tri jaroj kiel urbestro de urbo Ĝirono kaj poste kiel juĝisto de unua instanco. Ŝajne li malzorgis la gefilojn de sia unua geedziĝo; la jaroj sinsekvadis kaj li neadis ilin la patrinan heredaĵon. Dolores, posedanta eksterordinarajn belecon kaj aspekton edziniĝis sekrete en San Miguel de

los Navarros (preĝejo de la ĉefurbo Saragoso) je 1839 al Esteban Tovar. Li estis andaluzo, kiu ĵus forlasis la armeon kiel helpa leŭtenanto de la kolonelo de sia reĝimento kaj, laŭ sia estonta konduto, li nur avidis la heredontaĵojn de sia edzino.

Ekde la nupto komencis senfina sinsekvo de juĝaferoj pri la posedo de havaĵoj, kiujn S-ro Blas rifuzis cedi. La procesoj estis longaj, komplikaj kaj akraj, sed finfine la tuton el la heredaĵo ricevis Dolores kaj Tovar. Sed ili ne povis ĝui ĝin longe, ĉar pro la neregula kaj diboĉama vivo, kiun oni atribuas al Tovar, —kaj supozeble Dolores devis helpi iom al li— la paro devis vendi iom post iom siajn bie-



nojn, kies valoro superis cent milionoj da pesetoj (pli ol 600 000 nunaj eŭroj), kaj venis preskaŭ en mizeron. Ekde ties nupto ĝis preskaŭ la dua duono de la jarcento ili vivis en Kalatajud', kie ili naskigis kvar gefilojn: Enrique, Amalia, Manuel kaj Emilia Cruz, kaj tiam komencis la forĝado de la fifamo de Dolores. Poste la paro translokiĝis al Madrido. Unuavice ili loĝis en la strato Ballesta. En 1860 naskiĝis Casilda Enriqueta. En 1890 Dolores vidviniĝinte loĝis en strato Jardines (Ĝardenoj) kun sia filo Esteban,

naskiĝinta en Madrido je 1857. La lasta parto de ŝia vivo en Madrido trairis specialajn cirkonstancojn. Dolores mortis la 12an de aŭgusto de 1894 en la Palaco de la Markizoj de Altamira de la strato Flor Alta (alta floro), nombro 8, malsupra etaĝo, kaj pro manko da mono oni entombigis ŝin ĉarite en la Tombarejo de La Almudeno. Kvankam ŝajne paradokse, la ĉio ampleksa kono de ŝia vivo vera kontribuas eĉ pli —se ankoraŭ eblas— la elstarigo de la legenda bildo de La Dolores, kiu, ligita kun Kalatajud', estas konata disde la mondo.

Kiu estis kaj kio estas La Dolores?

Ŝi estis virino, kaj same kiel ĉiuj aliaj, ŝi dependis de la altrudoj de la vivo, kun siaj soroj kaj solvoj, grandeco kaj malfortikeco. Ŝi superelstaris pro eksterordinara beleco kiu kondiĉis sian ekzistadon. Ankaŭ estas atribueblaj al ŝi la trajtoj de la laboremo, entreprenemo, malavareco al la mizeruloj, rezolutemo, klereco super la averaĝa nivelo de la epoko, ŝi sufiĉe komprenis la kutimajn kaj politikajn aferojn de sia lando kaj estis preta por polemiki sukcese pri ili, kvankam ŝi rifuzadis fariĝin. Ŝi montris sin malkonfidema kaj rezerviĝema, kaj sentis grandan amon al sia familio. Dolores devis travivi epokon konfliktivan, plena de kolektivaj rankoroj kaj maltoleremo. Sian vivon mem dependigis de siaj volo kaj sia ambicia patro, kiuj interkverelis por la granda heredaĵo apartenanta al ŝi.

Antaŭ la menciita dilemo, forlasita

de siaj parencoj, estante inter glavo de insulto kaj muro de neamo kaj indiferenteco, ĉu Dolores serĉis ekster sia hejmo tiun varmecon, kiu mankis al ŝi?, ĉu pro kaprico?, ĉu pro venĝemo?, ĉu pro alia kaŭzo? Iel ajn plej malgravas kaj certeco kaj motivoj, ĉar estas nur homa tio, ke oni preteriras la limojn de ĝeneralaj normoj.

Tion ankaŭ faris multe da homoj antaŭ ol ŝi, kaj eĉ se ŝiaj agoj estus historie gravaj, memoro pri ili devintus malaperi, dissolvitaj en plej larĝan forgeson..., se anonima koplo ne kreintus la ĝermon, kiu naskis la miton pri "La Dolores". Kaj tiu rolo nova, modelita, puŝita de fantazio kaj arto de komponistoj, libretistoj, dramistoj, filmistoj, verkistoj, poetoj..., kaj kalkulante, certe, ricevecon



kaj partoprenon de homoj de ĉiuj tavoloj, pli kaj pli iĝis nuancoj, profiloj kaj surpriziga grandeco, devenigante legendan estaĵon, en miton kiu ne plu apartenas nur al Kalatajud', ĉar ĝi estas universala patrobieno.

Kultura patrobeno generita de "La Dolores".

Inter muzikaj komponaĵoj nomumitaj *La Dolores*, pintorangas la **Simfonio** de Mariano Obiols (1867); **Tanda de valzoj**, de Emile Ŝalteufel (1880); **Serenata**, de Carosio (1916); Poemo simfonia **Nokto en Kalatajud'**, de Paŭlo Luna (1924); **Marŝo hispana**, de Jozefo Sentis' (1927); kaj **Valso**, de Rampaldi (1930).


La unua filmo pri **La Dolores** estis filmita de Fruktuoso Gelabert kaj Enrique Gimeno je 1908; kaj poste venis la versioj de Maksimiliano Tous (1923); de Florjan' Rej, kun Konĉita Piker' (1939); **La koplo de La Doloroj**, de Benito Perojo, kun Imperio Argentina (1947) kaj **Animo aragona**, jam kolora, de Jozefo Oĉoa, kun Lilian de Celis (1961).

Pri teatraĵoj kaj operetoj, elstaras La dramo de Feliu kaj Codina (1892); **Doloroj... kapaj aŭ La kuraĝa lernanto**, parodo verkita de Granes', kun muziko de Arnedo (1895); Doloretoj, drameta eseo de Karlo Arniĉes kun muziko de Amadeo Vives (1901); **La filino de La Dolores**, de Fernandes Ardavin'; **Se vi iras al Kalatajud'**, opereto de Cesar de Haro kaj muziko de Esquembre (1932); kaj **Kio devenis el La Dolores**, dramatika komedio subskribita de Acevedo je 1933.

Ankaŭ La Dolores estis en noveloj: **La Maria**, de Dario Perez (1895); **La**

Dolores, historio de koplo, de Feliu kaj Codina (1897); **La Dolores, aŭ la knabino de Kalatajud'**, de Alvaro Carrillo (1900); kaj **Kalatajud' —iluzio— aŭ La koplo de La Dolores**, de Salvador Valverde kaj Ramon Zarzoso (1944).

Sed eble la plej granda kono kaj disvastigo de la legendo universalskale ŝuldiĝas al liriko. La opero de Tomas' Breton, premierita en Madrido je 1895, estis sekvita de tiu de Auteri Manzocchi (Florenco, 1875), la komedio **Desiree** de Henri Prys (Turnai, 1883); tiu opero de Andre Pollo-nais (Nico, 1897): la mimodramo muzika de Damas kaj Sentis' (Marsej-



lo, 1919); opereto de Germaine Tailleferre (Parizo, 1950); la **muzika romano** de Michel Maurice Levy, bazita sur la novelo **Maja floro**, de Vicente Blasko Ibanez (Parizo, 1952), kaj la baletto lirikodrama **Kiu estis La Dolores?**, interpretita de Baluarte Aragonas, kun Antonio Sanĉes Portero kaj sub direkto de Jozefo Miĥaelo Pamplona (Kalatajud', 1994).

Jen la fino ĉarma de la kanto: *Di que te lo digo yo, el hijo de La Dolores* (Diru, ke tiel diras mi, la filo de La Doloroj).

Jozefo Pina

Fia rideto

La monstro alproksimiĝas: klap, klap, liaj paŝoj aŭdeblas. Li venas je la pordo. Li provas malfermi ĝin sed ĝi estas ŝlosita. Krank! Per pugnobato, li kreas truon en ĝi, tra kiu li metas sian manon kaj malblokigas la pordon. Li eniras la ĉambron. Sed estas neniu!

Ŝi atendas lin tri ĉambrojn pli interne. De tie ŝi aŭdas la bruon, kiun li faras. La detruon, kiun li faras laŭ la loĝejo.

Subite oni frapas la sonorilon ĉe la pordo. La bruo farata de la monstro malaperas. Oni insistas ĉe la pordo. Nenion oni aŭdas. Ŝi havas la emon iri malfermi, sed tiumaniere la monstro vidus ŝin. Sekve, ŝi restas senmova. La vizito rezignas, kaj foriras.

Ŝi ankoraŭ estas en sia studoĉambro, ŝlosita. Ŝi ne povas telefoni: la monstro estas rompinta ĝin. Ŝi ne havas sian poŝtelefonon sur si. Ŝi estas en ĉambro sen fenestroj. Kaj tiam la monstro aŭdeblas sin denove, antaŭenirante laŭ la koridoro. Ĉak!, alia pordo frakasita. Pli proksime.

Finfine la monstro staras ĉe ŝia pordo. Li scias, ke ŝi estas tie ĉi. Ŝi miras, kiel li scias. *Eble li havas navigsistemon*, ŝi supozas.

—Malfermu!—, la monstro ordonas.

Silento.

—Malfermu, mi diris!

Pli da silento.

—Se vi ne malfermas tuj, la afero iros plej malbone por vi!

Eĉ pli da silento ankoraŭ.

La monstro pugnobategas la pordon, sed ĝi estas kovrita per ŝtalo, kaj pro tio ĝi ne frakasiĝas. Sed ĝi kurbiĝas iomete.

—Kiam mi eniros, restos de vi eĉ unu haro, se vi ne malfermas tuj.

Nun la silento estis plej bona.

La monstro pugnobatas la pordon. Li laciĝas pri tio, ĉar liaj ungegoj doloriĝas, kaj pro tio li batas ĝin per sia kapo. Nun la pordo estas tiom klina, ke la interno vidiĝas. *Ŝi ne estas ĉi tie*, li pensas. *Sed mi flaras ŝin. Ŝi kaŝas sin.*

Finfine, post kelkaj kapbatoj, la monstro sukcesas eniri, saltante sur la supra parto de la pordo. Li eniras la ĉambron.

El lia dorso, venas voĉo:

—Saluton, monstro.

Li turnas sin, surprizita.

—Nun vi vidos!

—Mi dubas—, ŝi diras, kun cinika rideto, elmetante pistolon el skatolo.

—Kio?

—Vi havas du gonadojn, sed mi havas ok klugojn. Surgenuiĝu.

Obeas monstro.

—Nun vi kuŝu sur la plankon, kun manoj je via dorso—, ordonas ŝi, tenante pistolon.

Kiam li faras tion, ŝi metas mankaptilon ŝtalan sur liajn manojn.

Ŝi uzas alian mankaptilon, pli grandan, sur liaj piedoj.

—Nun turnu vin. Kviete, aŭ mi pafos vin inter viaj okuloj.

La monstro grumblas, sed li turnas silente, kaj poste li ne moviĝas.

Ŝi iras al sia dormoĉambro, kaj tie ŝi trovas sian poŝtelefonon. Ŝi revenas en la studoĉambron. Tie kuŝas la monstro, freneza pro kolero.

Ŝi tajpas la polictelefonon.

—Saluton! Ĉu estas policejo? Mi vokas vin el Strato Olmo, nombro 47a. Venu tuj. Envenis danĝera frenezulo en mian domon. Jes, la pordon mi malfermas, sed venu rapide.

Kaj, kun fia rideto, ŝi metis cigaredon inter siajn lipojn.

—Ĉi tiu malvirto mortigos min iun tagon—, ŝi diras dum ŝi premas la ĉenon de la pistolo. El ĝia pinto venas lumeto, kiu fajrigas sian cigaredon. Poste, rigardante la eksilentan monstron kuŝantan, ŝi diras:

—Feliĉe ankoraŭ estas kelkaj, kiuj kredas ĉion, kion ili vidas.

Jack Crane
je la 12-a de
septembro de 2010



Mistera obeulino

de Jack Crane

Ŝi aperis preskaŭ el nenio. Li ofte vizitis ne tre rekomendindajn paĝojn de interreto, kie oni preparolis pri la malluma flanko de amo, BDSM¹. Tie multe da homoj parolis pri aferoj, kiujn ili komprenis aŭ prikonis diversegrade. Sed la fotoj estis altiraj, la tekstoj amuzaj, kaj fojfoje oni povis koni interesajn virinojn, kiuj interesiĝas pri tiu afero. Li vere sciis nenion, kiam li unue venis. Sed post kelkaj monatoj li sukcesis aranĝi rendezuon kun belulino blonda, kiu parolis al li abunde pri tiu temo, sed ankaŭ montris multe da timo, kaj finfine ili ne interkonsentis pri dua rendezuo. *Ne sufiĉas beleco*, li decidis, *se poste ŝi kreas problemon al vi*.

Dua renkontintino estis ne tiom bela, sed diskreta ruĝhararulino, ne tiom alta kaj maldika kiel la antaŭa, sed multe pli serioza, kaj lerta pri tiu temo. Ŝi havas interesan vidpunkton pri ĝi: *Unu el la du homoj ĉiam estas pli forta ol la alia, kaj tiu ne necese estas la viro, ŝi asertis kvazaŭ science. Pro tio, ni devas fari **tour de force**² antaŭ ni decidus kiu estas la mastro, kiu la sklavo. Li amuze kapjesis kaj demandis pri tio, kion ŝi proponas tiucele: *Mi kredas, ke mi plaĉas al vi, ĉu mi pravas?* Li denove kapjesis, do ŝi daŭrigis: *La venontan semajnfino, ni povas renkonti kaj**

sabaton kaj dimanĉon. Sabate mi estos via mastrino, kaj vi devas obei min blinde. Dimanĉe estos vi la mastro, kaj mi estos sklavino via. Je noktomezo, ni decidus, ĉu ni renkontos denove. Kaj se jes, ĉu ni decidus kiu estas kia dum tiu rendezuo, kaj sub kiuj kondiĉoj. Ĉu vi komprenas?

Li tute komprenis, ĉar li vidis, ke ŝi estas serioza pri la afero. Ili interparolis longe pri tiu alternativa seksa vivo, kaj iom post iom ili interkonatiĝis iomete. *Sed vidu, ŝi diris, ke vi havas vian vivon kaj mi mian, kaj ni ne konsentu, ke trudu unu en la vivon de la alia. Mi ne scias, ĉu vi estas edzo aŭ fianĉo, kaj ankaŭ vi ne scios pri mia sentimentala situacio, ĉar tio ne gravas al nia afero. La viro ekridetas nun je la vivo kun tiu virino, kiu tiom multe surprizas lin agrable ĉiun fojon, kiam ŝi malfermas sian buŝon...*

Laŭ la sekvinta semajno, li ne povis ne pensi pri ŝi. Li ne havas, feliĉe, telfononumeron ŝian, ĉar alimaniere li telefonintus ŝin ĉiam, kiam li pensis pri ŝi, tio estas, ĉiun tagon. Merkrede telefonis lin la blondulino, sed li ne multe interesiĝis jam pri ŝi, do li sentage interkonsentis vidi ŝin denove, iam.

Kaj venis sabato. Finfine. Ili renkontis rekte en hotelo. La ĉambro estis pagita de li, kaj li atendis ŝin tie, kiel ŝi estis petinta, tute nuda kaj surgenua. Ŝi eniris subite, kaj ligis liajn manojn kaj piedojn je lia dorso. Poste ŝi devigis lin adori ŝin, kaj ankaŭ provis vipon sur lin. Je la fino de la vespero, ŝi estis provinta

sur li preskaŭ ĉion, kion ŝi sciis, krom pendi lin el plafono, ĉar mankis rimedo por tio en tiu hotelo. Finfine, ili dormis unu apud la alia en la granda lito. Li tute nuda. Ŝi en noktovestoj.

Dimanĉon li vekiĝis vidante ŝin tute diversa: ne havante peton de li, ŝi simple staris surgenu antaŭ li, kun sia rigardo al planko, ankoraŭ en sia noktovesto.

—Saluton, sklavino!—, diris li ridetante. —Kian tagon ni havas?

Ŝi ne komprenis, ke la tutan matenon li ne profitis la okazon sekse, sed prenis ŝin al kafejo kaj gastigis ŝin matenmanĝe, kaj poste ili promenadis la tutan urbon, kaj li aĉetis al ŝi puloveron, mamzonon, kalsone-ton kaj minijupon ruĝajn. *Sed mi povus aĉeti tion por vi, se vi tion deziras, mastro, ŝi klarigis. Jes, reagis li, sed vi povas aĉeti la ŝtrumpojn, ĉapelon kaj ŝuojn ruĝajn, se vi volas, sed ĉio alia estas mia, etulino.* Dum matenmanĝo li diris al ŝi *ne mi devas aldoni sukeron al lia kafo*, kaj ke ŝi devas parkeri liajn preferojn manĝi kaj trinki, kaj ke ŝi ĉiam devas ŝofori lin, eĉ se li tion ne specife petos al ŝi. Li ankaŭ priskribis multe aliajn aferojn, kiujn li postulos, ke ŝi faru senhezite kaj senpetite. Posttagmee li gastigis ŝin al teatro, komentante poste ŝi je lia peto, la teatraĵon, **La besteto destrita**, de Vilhelmo Ŝekspir. Poste, vespermanĝo kaj nova promonado kaj diskutado pri ĝeneralaj aferoj de vivo kaj kulturo. Kaj finfine ili denove venis en la hotelon. Ĉifoje li malfermis unu el ŝiaj butonojn, kaj diris al ŝi: *Daŭrigu, ĝis kiam haltigita.*

Sed li ne haltis ŝin. Kiam ŝi jam estis tute nuda, li signalis al siaj vestaĵoj, kaj ŝi obeeme nudigis lin. Kiam ili ambaŭ estis tute nudaj, li signalis la liton, kaj diris: *Pretigu.* Ŝi malfermis la liton, kaj li kuŝis sur ĝi. Li gestumis apud li, kaj ŝi, obeeme, venis kuŝi tie. Li fermis siajn okulojn, kaj ŝi demandis: *Kion mi faru, mastro?* Li manfrapis ŝian kruron, kaj post kelkaj minutoj, li diris: *Unua kaj ĉefa regulo, sklavino: neniam vi parolu, ĝis kiam permesita. Eĉ por senkulpigi. Sklavino ne senkulpigas, ĉar ŝi ne kulpas. Mastro kulpas pro la eraroj de sia sklavino.* Duonhoro pasis silente. Kiam ŝi ekdormas, pensinte, ke li dormas de longe, li pasigis sian manon kaj brakon sub ŝia kolo, kaj diris: *Venu. Unua provo sukcesita.* Kaj tiel, li premante ŝian korpon kontraŭ tiu lia, ili dormis la tutan nokton. Kiam ili vekiĝis, frumatenan lundon, ŝi ne povis ne demandi: *Ĉu vi ne ŝatas mian korpon?* Kaj li, ridetante, respondis: *sklavino ne estas putino. Mastro ja povas uzi korpon de sklavino, sed nur laŭ lia decido. Jes, vi estas bela, kaj seksumi kun vi devas esti tre agrable, sed mi preferas obeemon, obeemon preter sekso.*

La tutan semajnon ŝi ne povis elirigi lin el sia menso. Neniam viro rifuzis ŝian korpon. Ŝi timis, ke ŝi ne povus ĉantaĝi lin per sekso. Kaj tio ekscitis ŝin. Multe. Ŝi sentis sin lia. Kaj ŝi sentis ion, kion ŝi neniam sentis antaŭe en sia vivo.

...daŭrigota

La faraono

Ĉapitro 30^a

En la sekvinta mateno Tutmozis kun granada sekvanto de l' oficiroj kaj korteganoj vizitis la fenician princon kaj invitis lin al la vic-reĝo.

Tagmeze antaŭ la palaco aperis Hiram, en simpla portilo, portata de ok malriĉaj egiptanoj, al kiuj li donacis almozon. Ĉirkaŭis lin eminentaj feniciaj komercistoj kaj la sama popolamaso, kiu ĉiutage staris antaŭ lia domo.

Ramzes kun miro salutis la maljunulon, de kies okuloj brilis la saĝo kaj de la tuta figuro seriozeco. Hiram portis blankan mantelon, sur la kapo oran ringon. Li salutis la princon kun memestimo kaj, levinte la manojn super lia kapo, diris mallongan benon. La ĉeestantoj estis profunde kortuŝitaj.

Kiam la vic-reĝo montris al li apogseĝon kaj ordonis al la korteganoj foriri, Hiram ekparolis:

—Hieraŭ, la servisto de via ekscelenco, Dagon, diris al mi, ke vi bezonas cent talentojn. Tuj mi sendis miajn kurieristojn en la urbojn Sabne-Ĥetam, Sethroe, Puto kaj aliajn, kie haltas la feniciaj ŝipoj, ke ili elŝipigu ĉiujn

komercaĵojn. Kaj mi pensas, ke post kelke da tagoj via ekscelenco ricevos tiun ĉi malgrandan sumon.

—Malgrandan!— interrompis la princo kun rido, —Vi estas feliĉa, via nobleco, se vi nomas cent talentojn malgranda sumo!

Hiram balancis la kapon.

—La avo de via ekscelenco—, diris li post pripenso, —la eterne vivanta Ramesses-sa-Ptah honoris min per sia amikeco; mi konas ankaŭ lian sanktecon vian patron (li vivu eterne) kaj mi eĉ provos prezenti al li mian respekton, se oni allasos min...

—Kiel tia dubo?—, interrompis la princo.

—Ekzistas tiaj—, respondis la gasto, —kiuj unujn allasas, aliajn ne allasas al la persono de l' faraono, sed tio estas indiferenta. Via ekscelenco ne estas kulpa, mi do kuraĝos fari al vi unu demandon, kiel malnova amiko de via avo kaj patro.

—Mi aŭskultas vin.

—Kion tio signifas—, diris malrapide Hiram, —kio tio signifas, ke la kronprinco kaj vic-reĝo devas prunti cent talentojn, kiam al lia ŝtato oni ŝuldas pli ol cent mil talentojn?

—Kiu?

—Kiel, kiu? La aziaj popoloj, kiel

tributon. Fenicio ŝuldas al vi kvin mil, kaj mi certigas, ke ĝi redonos ilin, se ne okazos io neatendita. Sed, krom tio, Izraelo ŝuldas tri mil, filistinoj kaj moabitoj po du mil, ĥetoj tridek mil... Fine, mi ne memoras la detalojn, sed mi scias, ke la tuto egalas cent tri, aŭ cent kvin mil talentojn.

Ramzes mordis la lipojn: sur lia vivplena vizaĝo oni vidis senfortan koleron. Li mallevis la okulojn kaj silentis.

—Tio do estas vera!—, eksopiris subite Hiram, fikse rigardante la vic-reĝon. —Tio do estas vera? Malfeliĉa Fenicio, sed ankaŭ Egipto...

—Kion vi diras, via nobleco?—, demandis la princo, sulkigante la brovojn. —Mi ne komprenas viajn plendojn.

—Vi scias, princo, pri kiu mi parolas, se vi ne respondas mian demandon—, respondis Hiram kaj leviĝis kvazaŭ por foriri. —Malgraŭ tio mi ne reprenas la promeson. Vi havos, princo, cent talentojn.

Li salutis tre humile, sed la vic-reĝo devigis lin reokupi la seĝon.

—Via nobleco ion kaŝas de mi—, diris li per voĉo, en kiu oni sentis ofendiĝon. —Mi volas, ke vi klarigu al mi, kia malfeliĉo minacas al Fenicio aŭ al Egipto?

—Ĉu vi ne scias pri tio, via ekscelenco?—, demandis Hiram kun ŝanceliĝo.

—Mi scias nenion. Pli ol unu monaton mi pasigis en la templo.

—Ĝuste tie oni povis ekscii pri ĉio...

—Via nobleco diros al mi!—, ekriis la vic/reĝo, batante la tablon per la pugno. —Mi ne amas, kiam oni sin amuzas jemia kosto.

—Mi diros, se via ekscelenco donos al mi grandan promeson, ke vi tion perfidos al neni. Kvankam..., mi ne povas kredi, ke al vi, la kronprinco, oni ne sciigis...

—Vi ne fidas al mi?—, demandis la princo kun miro.

—En ci tiu afero mi postulus promeson de la faraono mem, —respondis firme Hiram.

—Mi do ĵuras je mia glavo kaj je la standardoj de nia armeo, ke mi parolos al neni pri tio, kion vi komunikos al mi...

—Tio sufiĉas—, diris Hiram.

—Mi aŭskultas.

—Ĉu vi scias, princo, kio nun okazas en Fenicio?

—Eĉ pri tio mi ne scias!—, interrompis kolere la vic-reĝo.

—Niaj ŝipoj—, murmuretis Hiram, —el ĉiuj partoj de l' mondo rapidas



al la patrujo, por transporti, post unua signalo, la loĝantaron kaj la riĉaĵojn ien..., trans la maron..., okcidenten.

—Kial?

—Ĉar Asirio devas preni nin sub sian regadon.

La princo eksplodis de rido.

—Vi freneziĝis, respektinda homo!—, ekkriis li. —Asirio prenos Fenicion! Kaj kion diros ni? Ni —Egipto?

—Egipto jam konsentis.

La sango alfluis al la vizaĝo de l' kronprinco.

—La varmego malklarigas viajn pensojn, maljunulo—, diris li al Hiram per trankvila voĉo. —Vi eĉ fortesas, ke tia afero ne povas fariĝi sen la permeso de l' farono kaj... sen la mia!

—Ankaŭ tio venos. dume la traktaton faris la pastroj.

—Kun kiu? Kiuj pastroj?

—Kun la ĉefpastro ĥaldea, Beroes, rajtigita de la reĝo Assar—, respondis Hiram. —kaj kiu de via flanko? Mi ne povas diri tute certe, sed ŝajnas al mi, ke iliaj ekscelencoj Herhor kaj Mefres kaj la sankta profeto Pentuer.

La princo paliĝis.

—Atnetu, feniciano—, diris li, —ke vi kulpigas pri perfido la plej altajn estrojn de la ŝtato.

—Vi eraras, princo, tio tute ne estas perfido: la plej alta ĉefpastro de

Egipto kaj la ministro de lia sankteco havas la rajton trakti kun la najbaraj monarĥoj. Cetere, de kie vi scias, ek ĉio ĉi ne estas farata laŭ la volo de l' faraono?

Ramzes devis konfesi, en la animo, ke tia traktato ne estus ŝtata perfido, sed nur pruvo, ke oni malŝatis lin, la kronprincon. Jen kiel agas kun li la pastroj, kun li, kiu eble post unu jaro estos farono?

Jen kial Pentuer mallaŭdis la militojn, kaj Mefres subtrenis lin!

—Kiam tio okazis? Kie?—, demandis la princo.

—Ŝajnas, ke oni faris la traktaton nokte, en la templo de Set en Memfiso—, respondis Hiram. —Kaj kiam? Mi ne scias bone, sed ŝajnas, ke en la tago, kiam via ekscelenco forlasis Memfison.

"Kanajloj!", pensis la vic-reĝo. "Jen kiel ili respektas mian rangon! Ili do trompis min ankaŭ per la priskribo de la stato de l' regno? Iu bona dio vekis miajn dubojn en la templo de Hator..."

Post momento de interna batalo li diris laŭte:

—Tio estas ne ebla! Kaj mi ne kredos al viaj vortoj, ĝis vi ne donos pruvon.

—La pruvo estos—, respondis Hiram. —En unu el la plej proksimaj tagoj venos Pi-Baston granda asiria sinjoro, Sargon, amiko de l' reĝo Assar. Li veturas sub preteksto de pilgrimado al la templo de Astoret, li oferos donacojn al vi, princo, kaj al lia sankteco, kaj poste vi faros la

traktaton. En la realeco vi nur sigelos tion, kion decidis la pastroj por la ruino de Fenicio kaj eble eĉ por via propra malfeliĉo.

—Neniamis la princo. —Kian kompencon Asirio devus doni al Egipto!

—Jen estas parolo inda de l' reĝo: kian kompencon ricevus Egipto? Ĉarpor la ŝtato ĉiu traktato estas bona, se ĝi nur ion profitas per ĝi... Kaj ĝuste tio mirigas min, —daŭrigis Hiram, —Ke Egipto faros malbonan negocon: Asirio prenas, krom Fenicion, preskaŭ la tutan Azion, kaj al vi, kvazaŭ favore, lasas: izraelidojn, filistinojn kaj la duoninsulon Sinai... Kmpreneble, en tia okazo la tributoj, ŝuldataj al Egipto estos perditaj kaj la faraono neniam ricevos la cent kvin mil talentojn.

La vic-reĝo skuis la kapon.

—Vi ne konas—, diris li, —la egiptajn pastrojn: neniu el ili akceptus tian traktaton.

—Kial? La fenicia proverbo diras: pli bona estas hordeo en la grenejo, ol oro en la dezerto. Estus do eble, ke Egipto sentante sin malforta, preferus senpage Palestinon kaj Sinai, ol militon kontraŭ Asirio. Sed jen kio surprizas min... Ne Egipto, sed Asirio estas hodiaŭ facile venkebla: ĝi havas malpacon nord/oriente, posedas malgrandan kaj malbonan armeon. Se Egipto atakus ĝin, ĝi prenos la sennombrajn trezorojn de Ninivo kaj Babelo kaj

por ĉiam plantus sian regadon en Azio.

—Vi do vidas, ke tia traktato ne povas ekzisti—, interrompis Ramzes.

—Nur en unu okazo mi komprenus



tion, se la pastroj..., dezirus nuligi la reĝan povon en Egipto. Cetere, ili celas al tio de l' tempoj de via avo, princo.

—Ree vi parolas sensencaĵojn—, intermetis la princo, sed en la koro li eksentis maltrankvilon.

—Eble mi eraras, —respondis Hiram, atente rigardante liajn okulojn. —Sed aŭskultu, via ekscelenco...

Li alŝovis sian seĝon al la princo kaj parolis per mallaŭta voĉo:

—Se la faraono proklamus militon kontraŭ Asirio kaj gajnus ĝin, li havus grandan armeon adorantan lian personon, cent mil talentojn da antaŭaj tributoj, ĉirkaŭ ducent mil

talentojn de Ninivo kaj Babelo, fine ĉirkaŭ cent mil talentojn de la venkitaj landoj. Tia riĉaĵo permesus al li repagi la bienojn, kiujn li donis al la pastroj kiel pruntgarantion, kaj por ĉiam meti finon al lia sinmiksado en la regnan povon.

La okuloj de Ramzes brilis. Hiram daŭrigis.

—Hodiaŭ, kontraŭe, la armeo dependas de Herhor, sekve de la pastroj, kaj, sceptinte la eksterlandajn regimentojn, la faraono ne povas kalkuli je ĝi. Krom tio, la trezorejo de l' faraono estas malplena kaj la pli granda parto de liaj bienoj apartenas al la temploj. La reĝo, eĉ nur por la kortegaj elspezoj, devas ĉiujare fari novajn ŝuldojn; kaj ĉar fenicianoj ne estos plu ĉe vi, vi devos preni de la pastroj. Tiamaniere post dek jaroj lia sankteco (li vivu leterne) perdos la reston de siaj bienoj, kaj poste?

Sur la frunto de Ramzes aperis ŝvitaj gutoj.

—Vi do vidas, nobla sinjoro—, diris Hiram—, ke nur en unu okazo la pastroj povus, eĉ devus, akcepti plej malhonoran traktaton kun Asirio: se ili celus mallevi kaj nuligi la povon de l' faraono. Tamen, povas ekzisti ankaŭ alia kaŭzo: se Egipto estus tiel malforta, ke ĝi bezonus pacon je ĉiu prezo.

La princo salte leviĝis.

—Silentul!, ekkriis li. —Mi preferus la perfidon de plej fidelaj servistoj, ol tian malfortecon de la lando! Egipto devus cedi al Asirio Azion... Sed post

unu jaro ĝi mem falus sub ĝian jugon; ĉar subskribante sian honton, ĝi konfesus sian senfortecon.

Li paŝis bolante, kaj Hiram rigardis lin kun kompato, aŭ simpatio.

Subite Ramzes haltis antaŭ la feniciano kaj diris:

—Tio estas malvero! Iu lerta fripono trompis vin, Hiram, per ŝajna vero kaj vi kredas al li. Se ekzistus tia traktato, oni farus ĝin en plej granda sekreto, kaj en tia okazo unu el la kvar pastroj, kiujn vi citis, estus perfidulo ne nur de la reĝo, sed eĉ de siaj kunuloj.

—Povis ja esti iu kvina, kiu spionis iln—, intermetis Hiram.

—Kaj li venigis la sekreton al vi?

—Ŝajnas al mi strange, ke vi, princo, ne ekkonis ankoraŭ la pontencon de l' oro.

—Sed pripensu, via nobleco, ke niaj pastroj havas pli multe da oro ol vi, kvankam vi estas riĉulo super la riĉuloj!

—Mi tamen ne koleras, se venas al mi draĥmo. Kial ili forpuŝus talentojn?

—Ĉar ili estas servistoj de l' dioj—, diris la ekscitita prico, —ĉar ili timus ilian punon.

La feniciano ekridis.

—Mi vidis—multajn templojn en diversaj landoj, kaj en la temploj malgrandajn kaj grandajn statuojn. Sed diojn mi neniam renkontis.

—Blasfemulo!—, ekkriis Ramzes.

—Mi vidis dion, mi sentis sur mi lian manon kaj aŭdis lian voĉon.

—Kie tio estis?

—En la templo de Hator: en ĝia vestiblo kaj en mia ĉelo.

—Tage?, demandis Hiram.

—Notke—, respondis la princo kaj ekmeditis.

—Nokte vi aŭdis la parolon de l' dioj kaj sentis ilian manon—, ripetis la feniciano, skandante la vortojn.

—Nokte oni povas vidi multajn aferojn. Kiel tio estis?

—Mi estis kaptata en la templo je la kapo, brakoj kaj kruroj, kaj mi ĵuras...

—Pst!—, interrompis Hiram kun



rideto. —Oni ne devas ĵuri senbezone.

Li obstine rigardis Ramzeson per siaj penetremaj kaj saĝaj okuloj, kaj vidante ke en la junulo naskiĝas

duboj, li diris:

—Mi diros ion al vi, sinjoro. Vi estas nesperta, ĉirkaŭita de reto de intrigoj, kaj mi estis amiko de via avo kaj patro. Mi faros al vi unu servon. Venu iam nokte en la templon de Astoret, sed..., promesu konservi la sekreton. Venu sola, kaj vi konvinkiĝos, kiaj dioj alparolas kaj tuŝas nin en la temploj.

—Mi venos—, diris Ramzes post pripenso.

—Antaŭsciigu min, princo, iun matenon, kaj mi diros al vi la vesperan signalvorton de la templo kaj oni enlasos vin. Sed ne perfidu min, nek vin—, diris la feniciano kun bonkora rideto. —La dioj iafoje pardonas la perfidon de siaj sekretoj, la homoj neniam.

Li salutis la princon, kaj poste levinte supren la okulojn kaj manojn, komencis murmureti benon.

—Hipokrito!—, ekkriis la princo. —Vi preĝas al la dioj, je kiuj vi ne kredas?

Hiram finis la benon kaj diris:

—Jes, mi ne kredas je la dioj egiptaj, asiriaj, eĉ feniciaj, sed mi kredas je la Sola, kiu ne loĝas en temploj kaj ties nomo estas konata.

—Niaj pastroj ankaŭ kredas la Solan—, intermetis Ramzes.

—Ankaŭ la ĥaldeaj, tamen tiuj kaj la aliaj kunĵuris kontraŭ ni. Ne ekzistas vero en la mondo, mia princo!

Post la foriro de Hiram, la princo sin ŝlisis en la plej malproksima ĉambro sub preteksto legi sanktajn papi-

rusojn.

Preskaŭ fulme en lia fajra fantazio ordiĝis la novaĵoj kaj formiĝis plano.

Antaŭ ĉio li komprenis, ke inter la pastroj kaj fenicianoj brulas batalo pri la vivo kaj morto? Kompreneble, pro la influo kaj trezoroj. Hiram diris veron, ke se fenicianoj forlasus Egipton, ĉiuj bienoj de l' faraono, eĉ de l' nomarĥoj kaj aristokrataro transirus en la manojn de l' pastroj.

Ramzes neniam amis la pastrojn kaj de longe sciis kaj vidis, ke la pli granda parto de Egipto apartenas al la pastroj, ke iliaj urboj stas la plej



riĉaj, kampoj plej bone kulturataj, loĝantaro kontenta. Li komprenis ankaŭ, ke la duono de iliaj trezoroj savus la faronon el la senĉesaj klopodoj kaj relevus lian povon.

La princo tion sciis kaj ne malofte parolis maldolĉe pri tio. Sed kiam dank' al Herhor li estis nomita vic-reĝo kaj ricevis la korpuson de Memfiso, li paciĝis kun la pastroj kaj en la propra koro estingis la mal-

novan malkonfidon al ili.

Hodiaŭ ĉio ĉi revekiĝis.

Do la pastroj ne nur ne diris al li pri la traktato kun Asirio, sed eĉ ne antaŭsciigis pri la baldaŭa alveno de l' ambasadoro, de iu Sargon?

Eble ĉi tiu afero estas plej alta mistero de la temploj kaj ŝtato. Sed kial ili kaŝis de li la sumon de la tributoj, ŝuldataj al Egipto de diversaj aziaj popoloj? Cent mil talentoj, tio ja estas sumo, kiu tuj povus rebonigi la financon de l' faraono! Kial ili kaŝis tion, pri kio sciis tira princo, unu el la membroj de l' konsilantaro de ĉi tiu urbo?

Kia homo por li —kronprinco kaj vic-reĝo—, ke nur fremduloj malfermas al li la okulojn!

Sed estis ankoraŭ pli malbona afero: Pentuer kaj Mefres per ĉiuj rimejoj penis pruvi al li, ke Egipto devas eviti militon.

Jam en la templo de Hator tia insistado ŝajnis al li suspektinda: la milito ja povis liveri al la ŝtato centojn da miloj da sklavoj kaj pligrandigi la bonstaton de la lando. Hodiaŭ ĝi ŝajnas tiom pli necesa, ke Egipto devas repreni ŝuldojn kaj akiri novajn tributojn.

La princo apogis la kubutojn sur la tablo kaj kalkulis:

"Oni ŝuldas al ni", pensis li, "cent

mil talentojn da tributoj... Hiram pensas, ke rabinte Baibilonon kaj Ninivo, ni kolektus ducent mil, kune tricent mil per unu fojo. Per tia sumo oni povas pagi la kostojn de plej granda milito, kaj restus kiel profito kelkcento da miloj da sklavoj kaj cent mil talentoj da jara tributo de la venkitaj popoloj. Poste", finis la princo, "ni reguligus niajn kalkulojn kun la pastroj!"

Ramzes brulis da febro. Tamen venis al li konsidero:

"Kaj se Egipto ne povus venke batali kontraŭ Asirio?"


Sed ĉe tiu ĉi demando la sango ekbolis en li. Kiel, Egipto? Egipto ne sukcesus piedpremi Asirion, se antaŭ la armeo stariĝus li, Ramzes, li, la posteulo de Ramzes Granda, kiu

sola sin ĵetis sur la militajn ĉarojn de Ĥetoj kaj pecetigis ilin!"

La princo povis kompreni ĉion, esceptinte tion, ke li povus esti venkita, ke li povus ne elŝiri la venkon de plej grandaj potenculoj. Li sentis en si senliman kuraĝon kaj ekmirus, se iu ajn malamiko ne forkurus, vidante liajn galopantajn ĉevalojn. Sur la ĉaro de l' faraono staras la dioj mem por ŝirmi lin per ŝildo kaj trapiki la malamikojn per ĉielaj sagoj!

"Sed..., kion tiu ĉi Hiram parolis pri la dioj?", pensis la princo. "Kaj kion li volas montri al mi en la templo de Astoret? Ni vidos".

Eros,



dieto

de amo

AMOREVOJ EN NEGLIĜO

*Apenaŭ desur ŝia kapo
falas rozmareno,
de sceno malaperis
mistere vualita feino.
Ho lala, edzino dikiĝis.
Ĝĉ songe babilac̃as pri mono,
vestoj kaj manĝo.
La iam diafana feino.*

Jiři Karen



Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/k84.pdf>

Enhavo

Redaktore.....	2
Parolas la Prezidanto.....	3
La doloroj.....	4
Fia rideto.....	9
Mistera obeulino.....	11
La faraono, 30 ^a ĉapitro...	12
Amorevoj en negliĝoj.....	23

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon,
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respon-
decas la aŭtoro, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon kies enhavo
ne mistraktu personon.

Kovrilo: Iam ministro hispana diris, ke
estas pli bone morti ol mortigi. Nia prezidanto
diris energian *Ne al milito!* kaj *Nek unu
hispana soldato en milito imperia!*

Nun li sendas hispanajn soldatojn mortigi
alilandanojn, kaj eble morti en fora lando.

Tria frazo estis: *Hispanio ne meritus
registaron, kiu mensogas al ĝi!*

Nova konto La Caixa:

2100 4617 41 2200115275

**Tute verkita kaj kompilita per
senpagaj linuksaj rimedoj:**

OpenOffice Writer, Gimp kaj

Scribus.

Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.

ISSN 1697-6460